



LA LUKTO DE KOBANO, EKZEMPLO POR AFRINO

Dum la lastaj tagoj centoj da volontuloj sukcesis atingi Afrinon el aliaj partoj de Rojavo. Hieraŭ(*) estis la unua monato de la Turka agreso, kaj la civitanoj estas suferantaj gravajn mankojn.

Ednan Hessen estas kobanano(1). Dek unu membroj el lia familio mortis en la batalo kontraŭ la Islama Ŝtato. Parto el la diversflanka siria milito. Antaŭ kelkaj tagoj Hessen kaj centoj da civitanoj el Kobano kaj la pli orienta Serekanijo(2) ekvojaĝis al Afrino en solidareckaravano. “Mankas sango”, li raportis telefone. “La vunditoj nombriĝas po centoj, plejmulte estas civiluloj, kaj la hospitalo estas plenplena: virinoj, infanoj ... Kaj estas nenio.” Por la kurdoj, Afrino estas fariĝanta la sama rezistsimbolo kiel Kobano en 2014 sub la atako de la Islama Ŝtato.

Krom distrikto, Afrino ankaŭ estas urbo. Ĝi kuŝas preskaŭ 40 kilometrojn nordokcidente de Alepo, kaj antaŭ la milito la urbo Afrino kaj ties ĉirkaŭaj 380 vilaĝoj enhavis ĉirkaŭ 500 000 loĝantojn. Pro la multaj bataloj ĉirkaŭ Alepo, multaj homoj, senkonsidere de ties etna aŭ religia deveno, konsideris Afrinon kiel rifuĝejon. Tial, kiam Turkio komencis la atakon la 20-an de la pasinta monato, oni kalkulas, ke loĝis en Afrino 800 000 homoj; tio estas, 300 000 ellokigitoj el diversaj teritorioj de Sirio vivas en la kurda aŭtonoma distrikto.

Jam estas centoj da civilaj mortintoj kaj vunditoj. La virinoj kaj la infanoj rifuĝis en la grotoj ekzistantaj apud la vilaĝoj kaj en la keloj, kaj la homa situacio estas katastrofa. “En la hospitalo mankas ĉio”, rakontis Halil, volontulo de la Kurda Ruĝa Krescento(3). “Ni ne havas medikamentojn, ni bezonas ilaron por operacii, porinfanan lakton, purigilojn ... Ankaŭ mankas sango.” Krom paroli pri medicinaj materialoj kaj iloj li ankaŭ menciis, ke oni bezonas ĉiutagajn vestojn, litkovrilojn, nutraĵojn kaj akvon. La turka armeo speciale klopodis por detrui la akvoprovizadon.



Ĉiutage oni bombadis la vilaĝojn Ĝindireso(4), Diko(5), Erebeŝo(6) kaj Tilhemo(7). Domojn kaj konstruaĵojn oni detruis provokante multajn homperdojn. “En la hospitalo mi trovis familion, el kiu nur du membroj pluvivis”, rakontis Hessen. “Iliaj kvar gefratoj, inter 1 kaj 14-jaraj, kaj gepatroj mortis pro la bombadoj.”

Dum li donas sangon, Hessen memoras, ke li mem suferis tian perdon en Kobano, kaj li ne povas eviti la komparon inter la situacio de la du urboj. “Psike, estis tre malfacile por mi kaj miaj kamaradoj atingi Afrinon. Sed tial, ke antaŭ kvar jaroj en Kobano ni estis sub agreso, ni devis fari kontribuon al la rezistado de tiuj ĉi inoj kaj viroj.”

La disfalo de la Islama Ŝtato komencis en la Batalo de Kobano. “La turkoj ne volas vidi eĉ aŭtonomecon por la kurdoj”, asertis Delal, alia volontulo de Kurda Ruĝa Krescento. “Tion ni vidas tie ĉi, same kiel ni vidas ĝin en Norda Kurdio(8). Tamen ni daŭrigos la lukton, ĉar ni rajtas decidi, kiel ni volas vivi kaj kiel ni volas regi nin”.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Loĝanto de Kobano. Kobanî.
- (2) Serê Kaniyê.
- (3) Heyva Sor a Kurdistanê.
- (4) Cindirêse.
- (5) Dîkê.
- (6) Erebe Shexo.
- (7) Til Hemo.
- (8) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.

KLARIGOJ:

Aŭtoro: J.M. Arrugaeta kaj Orsola Casagrande.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berrria la 21-an de Februaro 2018-a.

Tradukis: NXC. Februaro 2018-a. Provlegis: DS.

